

VOLUME 1

JULY, 1907

NUMBER 6

A Journal of the International Language

AMERIKA ESPERANTISTO

(AMERICAN ESPERANTIST)

PER COPY, TEN CENTS
PER YEAR, ONE DOLLAR

1239 Michigan Avenue, Chicago, U. S. A.

FAKO DE KORESPONDADO

^a Oni deziras nur leterojn ; ^b nur poŝtkartojn ilustritajn.

UNUIGITAJ ŜTATOJ AMERIKAJ

JOHN H. GRAY, 280 17th Ave., San Francisco, Calif.
WM. STANTZ, 721 Folsom Street, San Francisco, Calif.
H. LAWS, "Walmond," Applegate, California
F. E. SMITH, 217 Eleventh St., Oakland, California
M. J. CALLAHAN, Brownell, California
CHAS. A. STEERE, Box 11, National City, California
A. R. LINDSTEDT, 1419 E. 17 St., Los Angeles, Cal.
HARRY D. BRYANT, Sheldon, California
KENNETH SMITH, 606 N. Nevada, Colorado Springs.
MAURICE I. FEINBERG, 719 31st St., Denver, Colo.
Sno. THOS. C. HATTON, Minneola, Florida.
J. C. FLYNN, 602 Austell Building, Atlanta, Georgia
ROBERT WELLS, 300 Kennesaw Ave., Marietta, Ga.
F. J. PETERS, Golden, Illinois
Sno. CLARA TODSON, 28 The Spurling, Elgin, Ill.
F. J. M^cKENNA, 6805 Prairie St., Chicago
^aS. R. OLMSTEAD, 5712 Erie St., Austin, Chicago
^aCHAS. E. HEDREY, 359 Jackson Boulevard, Chicago
BURLEIGH L. COOMBES, RFD. 28, Chesterfield, Ill.
WINIFRED SACKVILLE STONER, Evansville, Ind.
FLOYD HODSON, RFD. 10, New Castle, Indiana.
A. W. BEACH, Sheldon, Iowa
C. G. W. CLAUSEN, St. Ansgar, Iowa
GEO. H. FRACKER, Storm Lake, Iowa
N. A. PUDERBAUGH, 17 & Villas, Leavenworth, Kan.
^aWM. A. ROSELLE, Ft. Thos. Station, Newport, Ky.
C. H. BARROWS, Lamoni, Louisiana
E. K. SCHULTZ, 1740 Park Ave, Baltimore, Md.
N. A. C. SMITH, 27 Downing St., Worcester, Mass.
F. M. MILLER, 70 West St., Pittsfield, Mass.
F. CUNNINGHAM, 909 Exchange Bldg, Boston, Mass.
Dro. E. J. THOMPSON, 17 Market St., Lynn, Mass.
^aHARRY E. FARRAR, Box 1516, Lee, Mass.
Fno. GEORGIA E. CLARKE, RFD. 3, Deford, Mich.
T. R. HOORN, 629 Railroad Ave., Fergus Falls, Minn.
^aE. J. M^cKINNEY, 405 Charles St., St. Paul, Minn.
W. S. JOHNSON, Tuscumbia, Missouri
J. BIANCHI, Columbia, Missouri
^aGLEN H. BROYLES, Bethany, Missouri
H. E. WILLIAMS, Newtown, Missouri
J. M. RECTOR, Monarch, Montana
WILLY BRACH, Smithfield, North Carolina
^aT. J. BRACKETT, RFD. 1-17, Greenland, N. H.
GEO. W. MARTIN, Box 34, Metuchen, New Jersey
ALFRED D. KARR, 822 DeGraw Ave., Newark, N. J.
^aA. G. CRAIG, "La Hacienda," Alpine, New Jersey
HAROLD BUNKER, Merrick, New Jersey
JACOBSON HYMAN, 320 W. 26 St., New York City
WM. MITCHELL, 602 W. 146 St., New York City

(Al la 3^a de la kovrilo)

Amerika Esperantisto

Application pending for entry as Second Class Mail Matter

Ĉiumonata Revuo de la Lingvo Internacia, Esperanto
Monthly Magazine of the International Language, Esperanto
1239 Michigan Avenue, Chicago

Jarabono, ie en la Mondo, Unu Dolaro (Frankoj 5.25)
Yearly Subscription, Anywhere on Earth, One Dollar

AMERIKA ESPERANTISTA KOMPANIO, ELDONANTOJ
AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, PUBLISHERS

Redaktoro : ARTHUR BAKER : *Editor*

Ĉiu manuskripto estas, se tiel petate, nepre resendata al la sendinto. La redakcio rifuzas nenion sekve de ĝia temo, aŭ politika aŭ alia; kaj senescepte retenas al si la rajton korekti manuskriptojn. Sendu verkon.

VOLUME 1

JULY, 1907

NUMBER 6

Chicago, the most American, and at the same time the most cosmopolitan of American cities, was recognized by me from the first as the logical point of attack for an international language propaganda. Private affairs alone kept me, until recently, in Oklahoma, but let me assure you that I am not wedded to urban life by ties of affection; and there's nothing to prevent my fleeing this varnished hell we call Chicago and issuing our little journal from some place where the sun shines. However, there is small probability of another change soon. This number, as you will kindly observe, is dated July, in conformity with an agreement with the postal department. The serial number follows that of February, so that all subscriptions will be advanced four months, and every subscriber will receive the full number of issues paid for. So *don't* write inquiries concerning the lapsed months. Subsequent issues will appear about the 20th of the month preceding the date.

Pictorial Comedy, *Fleet Street, London*, publikas la klarigojn de siaj ilustraĵoj en Esperanto. Estas tre bone, sed ho ve! ho ve! kial ne sendu ŝlosilaron kun ĝiaj tiel nomataj humoraĵoj anglaj? Tiam, ĝin legante, ni Amerikanoj pli ŝate plorus; estas tre malagrabla elverŝo la larminojn pogranda sen klara kompreno de la kaŭzo.

LA NOVA PATRIOTISMO

Profunde enradikigita en la homa naturo estas amo al la kunkuro, al la batalo, al la reciproka provo de forto. Ke tiu ĉi estas pli aŭ malpli besta en sia karaktero oni ne povas nei. Kiam la scienco jam estas konstatinta ke la homa raso parenciĝas kun ĉiu alia estaĵo, ne estus logika se ni atencus kredi ke oni ne estas laŭ naturo iomete lupa, vulpa, simia, porka, kaj eĉ ŝafa. Sed unu gento de la sovaĝaj bestoj ne malpacas inter si dum la ĉeesto de komuna malamiko. Kiom ajn malmulte ili scias, ili estas tro saĝaj por tio!

Ĉu ne ni, fieraj kuzoj de la "malpli altaj" estaĵoj, povas de ili lerni lecionon? Ĉu ne estas la morto, la malsano, la malsato, kune kun la sufokaj ligiloj de nescio kiuj detenas la animon de ĝia suprenflugado—ĉu ĉiuj ĉi tiuj ne sufiĉas kunigi la tutan homaron por la komuna afero? Oni kredas, ke ne. Sed ekzistas drakono, fajrspira, ŝtaldentega, de la homo mem kreita, kiu, ne detenata, iĝos teruro pli ega kaj pli reala, ol la drakonoj de mitologio. Mi parolas pri la maŝino. Baldaŭ estos ĉiuj rimedoj de la homa vivado transdonitaj al la maŝino. Kaj la homaro de la mondo devas posedi mem la maŝinon aŭ refariĝi sklavaro, ĉar kies la rimedoj de ekzisto apartenas ne al li, tiu persono estas sklavo.

La maŝinaron de la mondo devas posedi la popolo aŭ esti de ĝi posedata. La batalsigno sonas; la frontoj formiĝas ĉirkaŭ la mondo. En tia okazo, kiel maltaŭga, kiel malestiminda, tia patriotismo kia vante fanfaronas pri sia hejma lando, ĝiaj "kantaj birdoj," "blua ĉielo," "virtaj virinoj" kaj simila senencaĵo infana, kiel diras unu knabeto al alia: "Ho, nia kelopordo estas pli glata ol la via!" "Patrujo" estas la signaldiro per kiu ruzuloj allogas la homajn ŝafojn en la buĉejon, kaj patriotismo, kiel diris unu fama filozofo, "la lasta rifuĝejo de la kanajlo."

Estu la mia tiu nova patriotismo, kiu salutas la standardon levitan je la nomo de la homaro, kiu proponas la fratan manon al la homo de iu lando kun amika parolo, kompreneble parolo esperanta.

BOHEMUJO, PERLO EN HABSBURKA KRONO

Bohemujo estas bela, benata lando, kaj kun fiero ni nomas ĝin la perlo de nia monarĥio. Havante la situacion en multa kaŭzo tre oportunan, eĉ eminentan, kaj estante krom tio fruktodona lando, per granda riĉaĵo de naturaj donacoj talenta, fariĝis la Bohemujo en eŭropa historio bonveninta rifuĝejo de nacioj elserĉantaj novajn loĝejojn. Ĉe tio naturo estis partia al oriento, faciliginte eniron el tiu ĉi flanko, kaj defendiginte per naturaj digoĵoj, per altaj montaroj, aliron de okcidento. Bohemoj estinte el ĉiuj slavoj plej okcidente ŝovitaj, ili devis pruvi dum homaj epokoj sian problemon en Eŭropo kiel per sia kultura vivo, tiel per defendo de sia situacio je limo de okcidenta kaj orienta vivo. Nature aperadiĝis eĉ interligo de Bohemujo kun regno, kiu regas je dunaj.

Bohemujo estas ĉirkaŭataj de montaroj; la interno de la lando estas pli multe monteta, kaj havas kampojn riĉegajn je greno. Multaj urboj kaj vilaĝoj, belaj, vastaj arbaroj beligas pejzaĝojn, nome limajn montojn, "Ŝumava" kun plej grandaj kaj bonegaj bohemiaj arbaroj, el kiuj de ĉie brilas majesteco kaj beleco per eterna Regnanto tiel multe elkreitaj. Sed ankoraŭ pli multe majestaj montaroj "Krkonoŝe," nia "Snezka" (neĝa montego) ĉiujare logas multe da vojaĝuloj, kiuj tre amuziĝas per luksa rigardo en vastan pejzaĝon! Sur la limo inter Bohemujo kaj Saksujo etendas sin "Rudohori" (Minejmontaro), kiu havas nomon laŭ riĉoj de metaloj, kiujn ĝi en si enhavas. Ĉarmaj anguletoj de "Ĉeske Švycarsko" (Bohema Svisujo) logas milojn da turistoj, kiuj ne forgesas viziti ankaŭ ŝtonegojn Teplicajn kaj Adrsbachajn, kiu faras tutajn murojn de stratoj. Jen estas fendego, tie malhela groto; alie staras montetoj, al kiuj donis la vetero plej diversajn formojn kaj homa fantazio diversajn nomojn. Kiel estas ondoformigita supraĵo de habsburka perlo, tiel estas riĉaj ĝiaj teraj internaĵoj je mineraloj. Oro kaj fero, bohema fama granato kaj ordinara siliko, kaj inter ili longega riĉa vico de metaloj, de juveloj kaj mineraloj, faras tiun brilantan diademon de habsburka krono, kaj nia popolo diligente entreprenas almetas la manon, por ke la ŝtonegoj elŝprucu bonfaranta fonto de nutraĵo.

Amerika Esperantisto

Nia lando posedas multege da ŝtonigoj, maloftajn formaciojn geologiojn, kaj multaj eĉ fremdaj scienculoj glorigis tiun ĉi landon per siaj sciencaj laboroj, ekzemple Barrande. Diligentaj loĝantoj jam baldaŭ sin okupis je malgranda industrio, je metioj, kiuj tempe ekfloris en fabrikoj de tutmonda famo. Kiom ĉe ni estas da fabrikoj de maŝtramaŝinoj, kiom da fabrikoj je prilaboro de fero (ekz. en nia urbo Plzen [angle *Pilsen*] *Škodovy zavody*—*Škoda fabriko*).

Popolekonomian signifon havas sukera industrio, kiu estas sen kontraŭstaro sur la unua loko de sia fako en eŭropaj landoj. Ĉe ni trafaris tiu ĉi industrio ankaŭ grandegan evolucion, kaj multaj eltrovoj kaj plibonigoj de produktado prenis tie ĉi sian devenon. Per sistema regulo de laboro, per klarigo de multaj procesoj je scienca fundamento, per progreso de bierfara tekniko, ni signifas grandan disvolvon ankaŭ sur tiu ĉi kampo de industrio. Bohema biero—plzena—vojigadas ageme vojon trans la limoj en ĉiujn partojn de la mondo. Kuro laŭ bohema maniero disvastiĝis rapide kaj enradikiĝis nome en najbaraj landoj de nia perlo. Simile disvastiĝis ĉe ni ankaŭ cetera industrio; ni preparolu nur pri alkohola branfaro, lignoindustrio, industrio muelista, tekseja, prilaboro de juveloj, nia vitroindustrio, ferprodukto, produktado de kalko kaj cemento, kiuj ĉiuj fakoj alportas al nia lando grandegan riĉon.

Lerneajn sukcesojn sekvas kun streĉo ĉiu sincera kaj de estonteco de sia patrujo kaj nacio atentema burĝo. La lernejoj perfektigas ĉe ni ĉie, nome la elementa lernejo de tempo de Imperiestrino Marie Terezie (1740-1780). Kiajn korektojn kaj utilajn reformojn ricevis tiu ĉi lernejo dum la regado de nia plej glorega reganto, František Josef I! Bohema universitato estis fondita en 1348; ĝi estas la plej malnova en landoj norde de Alpoj. Kaj kiom estas ĉe ni da fakaj lernejoj, da mezaj, terkulturistaj, kiuj atestas pri anima evolucio de nacio. Tiun ĉi evolucion ni rigardas ankaŭ en nia literaturo kaj en pentra, statua kaj muzika arto. Estas neeble kompari nian nacion kun alia nacio, por ke ĝi havu relative tiom da eminentaj reprezentantoj de arto, kiom la nia nacio! Ni memoriĝu nur nomojn de nia pentristoj. Ili estas: Manes, Hynais, Brozik kun sia "Majstro Jan Hus Antaŭ Konsilo en Kostnice" (tiun ĉi tempon priskribas broŝuro, *Majstro Jan Hus* [John Huss]). Plu per pentrita arto gloriĝis: Maks, Sochor, Zenišek, Marold, Chiteusi, fratoj Liebscher, Ŝvajgr, Nemejc, Ŝpilar,

Mucha kaj aliaj. La laste nomata loĝas nun en Parizo.

Serio de katatastrofoj, kiuj persekutis nian patrujon de fatala jaro 1618, rompis materialan bonfarton kaj animan vivon de bohema nacio. Ne ĉesis resoni sur tero la milita bruego. Sed ankaŭ kiam komencis la paco, nia literaturo ne povis tuj refreŝiĝi. La bohema lingvo estinte dum longaj jaroj nezorgita, treege malleviĝis. Ĉirkaŭaj nacioj tre multe daŭriĝis en nia civilizacio, kaj rondo de sentoj kaj pensaĵoj devenintaj ĉe ili, torente fluis en nian patrujon. Ŝajnis, ke nia lingvo ne havas la kapablon per ke ĝi faru ree novajn fruktojn. Sed do patrineta lando naskis filojn, kiuj ekpreniĝis de verko, kaj nian lingvon, kiu ŝajnis, ke ĝi malaperos de tera supraĵo, ili refoje levis. Tio estis precipe: Dobrovsky, Kramerius, Palacky, patro de bohema historio, Ŝafarik, Ĝelakovsky kaj aliaj, kaj nuntempaj gloraj poetoj.

Kun fanfaroneco ni povas ankaŭ paroli pri nia historio, kiu estas tiel riĉa kaj glora, ke per ĝi povus paradi ankaŭ monda nacio. Ne estas popolo en Eŭropo, per estinteco tiel glora, kaj tiel malfacile provita kaj senhonorigita, kiel estas la nia nacio! Estis tempoj, kiam nia popolo distingiĝis per kuraĝo, per civilizacio super aliaj, sed venis ree tempoj, kiam lacigita kaj turmentita, ili troviĝis sur rando ne pereu. Nia popolo havas virojn, kiuj per siaj fortaj karakteroj, per altema volo ekscitas admiron kaj miregon en ĉia koro!

Jam antaŭ longa tempo ni havis gloran virinon tre saĝan, Libuše. Kun fiero ni memoriĝas je kuraĝa Bretislav, Premysl I^a kaj II^a, Vaclav (sanktulon) II^a, je Karel IV^a, "patro de patrujo," kaj je Jirik, kiu estis de sia nacio amata! Kaj kiu ne rekonus tiun grandan historion, milito de samideanoj de Majstro Jan Hus! Kanto de batalistoj, entuziasmaj per lernado de sia majstro, kaj glavo de Ziŝka tremiĝis tutan Eŭropon. Kaj tuj refoje la batalo ĉe Lipany ĵetis mallumajn ombrojn sur la pentro de nia gloro! Tempo de historio flugis plu en sia direkto, kaj ĉe ni devenis ĝojigaj tempoj. Popolo amis tian teron, kiu ilin naskis, kaj lertaj viroj, kiuj la boheman lingvon estimis kaj perfektigis, devenis de tiu ĉi popolo. Sed venis teruregoj de tridek-jara milito, plej terurega tempo en nia historio. Sur "Bila Horo" (Blanka Monto) estis enterigitaj ĉiaj rajtoj de bohema popolo, kaj al ili estis dum longaj jaroj forprenigita vivo de memstara nacio. La bohema nacio perdis plej

bonan sian eminentularon, kiu aŭ mortadis sub mano de ekzekutisto, aŭ forkuradis en fremdalandon, ekzemple nia Komensky, instruisto de ĉiuj popoloj. Sed nia nacio vekigis subite el longa dormeto, kaj estante kondukata de patriotoj, kuraĝigata de glora estinteco, denove ĝi leviĝis per sia forto kaj metis sin en vico de plej lertaj nacioj.

Tial nia glora patrujo estas al ni plej kara kaj plej sankta super ĉio en la mondo. En la patrujo ni ekvidis plej baldaŭ la dian lumon, en patrujo ni eklernis la unuajn tonojn de nia patrina lingvo; sciencojn, saĝon ni ellernis. La nia patrujo estas komuna patrino de ni ĉiuj, kiu nin ĉiujn zorge kaj afable edukis! Kaj tial ni estu al ĝi ĉiam dankemaj, amu ĝin kaj kantu al ĝia glorigo entuziasme el koro nian belegan nacian himnon:

*Kie estas patrujo mia?
La akvo muĝas tra floraroj,
Arbaroj, siblas tra rifaroj,
En parko brilas floro de printempo.
Tio estas edeno sur vidaĵo,
Kaj la tero tia, tiel belega,
Estas Bohemujo, patrujo mia.*

Originale verkis *Marie Kutilkova*, Plzen, Bohemujo, Eŭropo.

EL "LA PREDIKANTO"

Vortoj de la Predikanto, filo de Davido, reĝo en Jeruzalemo. Vantaĵo de vantaĵoj, diris la Predikanto, vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo. Kian profiton havas la homo de ĉiuj siaj laboroj, pri kiuj li penas sub la suno? Generacio foriras kaj generacio venas, kaj la tero restas eterne. Leviĝas la suno kaj subiras la suno, kaj al sia loko ĝi rapidas, kaj tie ĝi leviĝas. Iras al sudo kaj reiras al nordo, turniĝas, turniĝas en sia irado la vento, kaj al siaj rondoj revenas la vento. Ĉiuj riveroj iras al la maro, sed la maro ne pleniĝas; al la loko, al kiu la riveroj alfluas, ili alfluas ĉiam denove. Ĉiuj vortoj estas malfortaj, ne povas homo ĉion eldiri; ne satiĝas la okulo de vidado kaj ne pleniĝas la orelo de aŭdado. Kio estis, tio estos, kaj kio estis farata, tio estos farata, kaj ekzistas nenio nova sub la suno. Ekzistas io, pri kio oni diras: "Vidu, tio ĉi estas nova"; sed ĝi estis jam en la eterna tempo, kiu estis antaŭ ni. Ne restis memoro pri la antaŭuloj; kaj ankaŭ pri la posteuloj,

kiuj estos, ne restos memoro ĉe tiuj, kiuj estos poste. Mi, Predikanto, estas reĝo super Izraelo en Jeruzalemo. Kaj mi decidis en mia koro esplori kaj ekzameni per la saĝo ĉion, kio fariĝas sub la ĉielo; tiun ĉi malfacilan okupon Dio donis al la homidoj, por ke ili sin turmentu per ĝi. Mi vidis ĉiujn aferojn, kiuj fariĝas sub la suno, kaj jen, ĉio estas vantaĵo kaj aranĝoj ventaj. Kurbigitan oni ne povas rerektigi, kaj mankantan oni ne povas kalkuli. Mi parolis kun mia koro tiele: jen mi kreskigis kal multigis en mi sciencon pli ol ĉiuj, kiuj estis antaŭ mi en Jeruzalemo, kaj mia koro penetris multon da saĝo kaj scio. Sed kiam mi dediĉis mian koron, por ekkoni la saĝecon kaj ekkoni la malsaĝecon kaj sencecon, mi eksciis, ke ankaŭ tio ĉi estas entrepreno vanta. Ĉar ĉe multe da saĝeco estas multe da koleremeco, kaj, kiu plimultigas siajn sciojn, plimultigas siajn dolorojn.

El *La Revuo*, Parizo, Francujo. Tradukita el la Biblio de Dro. Zamenhof, kreinto de Esperanto.

ESPERANTO KAJ SOCIALISMO

Tio kion oni nomas interklasa batalo estas efektive batalo inter kreanto kaj kreaĵo; inter *la homo*, kreanto, kaj *la mono*, konkreta esprimo de la kreaĵo. Nur kiel parto de la homaro, alproprigante al si la kreaĵon, identiĝas kun ĝi, tiu parto ricevas apartan distingon. Ne estas grave ĉu oni diras ke la homo posedas la monon aŭ la mono la homon; ili unuigite identiĝas, kaj, la inteligenta parto de la kombino direktante la neintelligentan, ĝi subpremas la kreinton. Tial, ĉe la lasta analizo, la tiel nomata interklasa batalo sin montras batalo de la kreanto kontraŭ la kreaĵo. Estante mi mem socialisto, mi eble ne povus diskuti sen antaŭjuĝo pri la rajtoj de la kreanto respektive la kreaĵon; kaj *Amerika Esperantisto* ne estas socialista ĵurnalo. Sed mi devas atentigi vin pri tiu ĉi: ke niaj kamaradoj, la socialistoj, rigardas la interklasan batalon ĉiam de ĝia homa flanko; ĉiam subtenante la rajton de la kreanto kontroli la kreaĵon. Tiaj teorioj necese donas al ili elrigardon internacian, kaj tiel estas, ke en la internacia batalado de la proletario kontraŭ la kapitalistaro Esperanto havos gravan rolon. *La Appeal to Reason*, la plej grava gazeto en Nord-Ameriko rilate la interklasan batalon, estas fervora partiano de Esperanto, kaj kunhelpanto al tiu ĉi ĵurnalo. Mi povas preskaŭ certigi ke ĉiu socialista gazeto en Ameriko estas esperantista. Se ekzistas' escepto, mi pri ĝi ne scias.

PROGRESADO DE ESPERANTO

Ĉe la alproksimiĝo de la tempo por la Tria Internacia Kongreso Esperantista, estas inde ke ni konsideru bone la demando: Kiom da efektiva, materia progreso estas farinta Esperanto en la mondo? Ĝusta respondo ne estas ebla. Oni konsideru, ke tiel grande kaj rapide plifortiĝas la movado en Unuigitaj Ŝtatoj, ke eĉ tiu ĉi ĵurnaleto, kies la ofico estas antaŭenigu Esperanton en nia propra lando, ne povas sin detale informi pri ĝi, kaj ke ĝis la "finoj" de la tero ĝi tiel sin dissemas.

Dum la lerneja jaro ĵus fininta, Esperanto estis tre incitema temo por diskutado en multaj kolegioj kaj universitatoj de Ameriko. Grave kaj nee skuis la kapojn multaj sagacaj maljunaj profesoroj, kaj malestime ridis kaj argumentis multaj junaj studentoj. Tiel, ankaŭ, oni dubis en jaroj jam longe pasintaj, pri la sfereco de la terglobo; tiel malestime oni ridis la rondfluadon de sango. Multe tro multaj profesoroj malkomprenas sian funkcion, kredante sin esti fonto de la scio, kvankam ili estas nur iloj por ĝia disdonado. La deveno de Esperanto sin trovis ne en la entuziasmo de ĝiaj pioniroj, ne eĉ en la mira genio de Zamenhof, tiel superanta liajn Harvard'ajn kritikantojn kiel la eterna monto la talpaĵon ununoktan. Tute ne; lingvo internacia devenas de la homa neceseco, kiu malĝentile rifuzas sin solvi en nenieco ĉar, bedaŭrinde, ĝi malhelpas al la metio de iu sciofandista profesoro, kies ofico estas ŝuti malvivajn kaj iom ŝimintajn lingvojn en la kapojn de la gejunularo!

Per tio ĉi, ni tute ne diras ke ĉiuj instruantoj profesiaj sin tenas kiel kontraŭuloj al Esperanto. Tio estus nevera, ĉar multaj, eĉ *lingvaj* profesoroj, estas fervoraj propagandantoj por nia afero. La Universitato de Ĉikago, ekzemple, havas klubon kun cent membroj, inter ili kelkaj profesoroj. En lernejoj de la tuta lando kluboj estas organizitaj, kaj la agema diskutado en la ĵurnalaro, por kaj kontraŭ Esperanto, atestas ke ĝi ne estas senviva temo. *Scrap Book*, unu el la fama Munsey'a aro da gazetoj, nun enhavas fakon de Esperanto, redaktata de Sro. Powell. *The Saturday Evening Tribune*, de Seattle, donas grandan spacon al nia

En Brazilujo

afero, sub la bonega administrado de Sro. Randall. *The North American Review* kaj *Christian Endeavor World* daŭrigas sian propagandadon, kaj aliaj gravaj gazetoj baldaŭ sekvos.

Ĉiutage multiĝas elmontroj de la progreso farata de nia afero en Eŭropo. Kelkaj gravaj kaj progresemaj ĵurnaloj anglaj havas regulajn fakojn esperantajn, kiel ankaŭ granda nombro en Francujo. *Das Echo*, grava monata gazeto de Berlino, publikas regule aldonon esperantan. En Afriko, la movado tre rapide kreskas, precipe en tiuj partoj enloĝitaj de francoj kaj angloj. Sudameriko antaŭ nelonge starigis bonegan gazeton, *Brazila Revuo Esperantista*, kies 32-paĝaj kajeroj atestas fortan subtenadon.

Supre citita estas nur tre malgranda parto de la elmontroj de progreso farataj de nia afero. Sed oni povas diri, ke ni alproksimiĝas la Kongreson Trian kun espero de sukceso trifoje pli granda, ol antaŭe.

EN BRAZILUJO

Esperanto estas farinta en Brazilujo progresojn tiel rapidajn kiel ĝi neniam faris en ia parto de la mondo, ĉar dum ses monatoj fondiĝis ses societoj por la propagando de l' idiomo de Dro. Zamenhof. Ĝiaj progresoj estas tiel profitaj, ke ili altiris al Esperanto la publikajn registarojn, ĉar oni atentis la entuziasman konsenton, kiun Lia Moŝto, Sro. Ministro de Internaj Aferoj, donis por funkciado de kurso en la Nacia Gimnazio, Militoficejo por kurso en la Milita Kolegio tie ĉi en Rio, kaj tiu en Milita Lernejo en Porto-Alegre. Alia kurso duonoficiala estas tiu en Pedagogium, kiu speciale celas konigi Esperanton al la kleraj profesoroj de tiu domo, inde direktata de Sro. Olavo Bilac, konata en tuta Brazilujo, kaj kiu ankaŭ estas esperantisto.

Se la progresoj de Esperanto en Brazilujo ne estas pli grandaj, tio nur devenas de manko inter ni de lernolibroj; francaj libroj menditaj je centoj de la ĉefaj librejoj ĉi-tieaj, estas disvenditaj post du aŭ tri tagoj kaj ne kontentigas la loĝantaron, scivolan kaj avidan je kono. Sed ni esperas ke baldaŭ ĉiuj estos kontentaj.—*Brazila Revuo Esperantista*.

La malnova ideo sin daŭrigas per heredo; la nova, per instruado. Mi konigas je Esperanto centon aŭ pli da homoj ĉiumonate. Kaj vi, kara kontraŭulo, ion faros se vi naskos, eĉ dum tuta jaro, tiom da infanoj!

DIVERSAJ AFEROJ

Tutmonda Labora Societo organizos specialan kunvenon dum la Kongreso en Cambridge. Ĉiuj amikoj havantaj interesajn proponojn por prezenti, rilate al la "laborista movo," estas petataj ilin sendi kiel eble plej baldaŭ al la sekretario, *Sro. P. Blaise, 4 rue du Bourg-Tibourg, Paris IV^e*. Ĉiuj bonaj ideoj estos diskutataj dum la Cambridge'a kunsido. Inter aliaĵoj estos preparolataj: 1—Rimedoĵ uzotaj por disvastigadi Esperanton inter la gedungitoĵ. 2—La fondo de sekcioĵ en ĉiuj landoĵ. 3—Elekto de internacia konsilantaro. Por klarigoĵ pri la Societo, sendo de regularo, k. c., oni sin turnu al la supredonita adreso.

Bibliaj Tradukoj.—Unu tagon en la daŭro de la Tria Kongreso, okazos en Cambridge kunveno de personoĵ interesitaj pri la traduko de la biblio en Esperanton, celante: Sciigi pri la provoĵ jam faritaj, ĉu de komitatoĵ, ĉu de privatuloĵ; konsideri kiamaniere oni povos akiri tradukon vere internacian; konsiliĵi pri la rimedoĵ por la publikigo de tia traduko. Sciigoĵ pri ĝismunaj tradukoĵ de ia ajn parto de la biblio devas esti sendataĵ al *Pastro C. G. Wilkinson, Wareesly, Sandy, Angluĵo*, kiu pretigos raporton por la kunveno.

Esperanta Kantaro estas pretigota de germana samideano, kiu petas la sendon de ĉiuj esperantaj kantoĵ, kun muzikaj notoj. Oni adreso: *Sro. Otto Gehrke, Eleanoren Strasse 7, Weisbaden, Germanuĵo*.

Marista Esperantista Ligo.—Sub tiu titolo fondiĵis societo kies celo estas disvastigi uzon de Esperanto en la maristaro; iniciati aŭ helpi kian ajn organizacion, kies celo estas doni al marveturantoĵ, ĉe la havenoĵ, la profitoĵn elvenontajn el la uzo de Esperanto.

ESPERANTAJ RIDETOJ

Nasko kaj Morto.—Vivis iam du najbaroĵ. Iafoje okazis ke unu forveturis kaj transdonis al la dua kupran paton por gardado. Reveninte hejmen li repostulis sian

Amerika Esperantisto

paton, kiun la najbaro afable redonis, aldonante ankoraŭ malgrandan kupran pateton.

“Tiu ĉi ja ne apartenas al mi, mi donis al vi nur la grandan paton,” diris la reveninta.

“Ĝi tamen apartenas al vi,” rediris la unua, “ĉar dum via foresto la granda pato naskis idon.”

“Tio ĉi ja ne estas ebla.”

“Sed estas tiel,” diris la unua, devigante la najbaron akcepti la “patidon.”

Post kelka tempo la unua najbaro devis forveturi kaj lasis ĉe la dua en gardo paron da arĝentaj kandelingoj. Al la reveninto la gardinto donis nur unu kandelingon kaj kiam li postulis la duan, la najbaro bedaŭris, ke dum lia foresto unu kandelingo mortis.

“Kiel ĝi estas ebla? Ĉu kandelingo povas morti? Ĝi ja estas objekto, ne viva estaĵo.”

“Nature,” respondis la riproĉita, “ĝi estas tiel same ebla, kiel mia pato naskis idon.”

—*Dro. J. Fels, en Pola Esperantisto.*

Lia Kruea Sorto.—Unu skoto troviĝis ploranta.

“He, Saunders,” diris najbaro, altirita de la sonoj de malĝojo, “kio estas je vi?”

“Ho ve! ho ve!” ploregas Saunders, “la edzino de Donald Mackintosh jam estas mortinta!”

“Kio devenas de tio? Ĉi ne parencas al vi.”

“Tion mi scias, sed ŝajnas, ke ĉiu ricevas ŝanĝon escepte min!”

—*Charleston News and Courier.*

Multvalora Hundo.—“Vi havas tre belan hundon.”

“Li ja estas; tiu hundo estas tiel inteligenta kiel mi.”

“Mi pagos al vi por li kvarondolaron.”

—*Philadelphia Record.*

La Familia Etato.—Sro. Brown ĉiam zorgis pri la ŝajno de pli alta etato ol tiu, kiun li efektive havis. En unu okazo li promenis kun sia fileto, kaj permesis lin ludi kun kelkaj aliaj knaboj. Irante hejmen Brown demandis:

“Nu, pri kio vi parolis kun tiuj knaboj?”

“Ho,” respondis la filo, “mi diris ke vi estas la nia lakeo! Mi devis dece konservi la ŝajnon, vi scias.”

—*Argonaut.*

INTERNACIA PROPAGANDEJO

La laborado kaŭzita de la eldono kaj disvastigado de miaj ŝlosiloj^a tiom pliiĝis kaj kreskis, ke mi jam ne estas kapabla plenumi ĝin sola. Por doni malgrandan ideon pri la kreskado eble sufiĉas diri, ke dum la pasinta jaro miaj presistoj ricevis la sumon da 16,000 frankoj, kaj ke la valoro de la provizo da ŝlosiloj kaj de la nepagitaj ŝuldoj reprezentas sumon de preskaŭ 10,000 frankoj, kiu sumo kredeble duobliĝos en la nuna jaro, ĉar estos eldonataj 6 novaj ŝlosiloj.

Por daŭrigi la eldonadon de tiuj ĉi propagandiloj en ĉiuj lingvoj, kaj por certigi la sendependecon de la entrepreno, kaj ke ĝi servu nur al propagando, ne celante monĝajnon, mi formis, sub la nomo *Internacia Esperantista Propagandejo*, komitaton el sep anglaj esperantistoj, sub la estreco de Major-Generalo Cox; kaj al tiu komitato mi transdonis ĉiujn ĝis nun aperintajn propagandilojn, kune kun ĉiuj rajtoj kaj privilegioj.

La ĉefa celo de la Propagandejo estos la eldono kaj disvendo de: 1—Propagandaj ŝlosiloj enmetebraj en leterojn kaj pezantaj 5 gramojn, je la vendprezo de 5 centimoj. 2—La samaj libretoj presitaj sur pli bona papero, kaj kun ia aldono por pravigi pli altan prezon, kiu ebligas disvendadon per helpo de librovendistoj, je la vendprezo de 10 centimoj.

La kapitalo necesa por plikonduki la entreprenon tra almenaŭ tri jaroj estas garantiata kaj prunto donita de unu el la komitatanoj, kiu ankaŭ garantias la komitatanojn kontraŭ perdo. Tiu ĉi komitato elektos kunhelpantan internacian konsilantaron po 3 konsilantoj de ĉiu lingvo.

La letera adreso de la komitato estos: *Internacia Esperantista Propagandejo, Merton Abbey, London, S. W.* kaj mi petas ĉiujn esperantistojn ke ili direktu ĉiujn leterojn, mendojn kaj monsendojn al tiu ĉi adreso.

—E. Ĉefeĉ.

Vi demandu vin jene: "Kion *mi* povas fari por akceli la progreson de Esperanto?" Se la respondo ne sin prezentas, skribu leteron al la redakcio de tiu ĉi revuo.

^aLa "Ĉefeĉaj Ŝlosiloj" estas etaj broŝuroj, enhavantaj klarigon pri la gramatiko de Esperanto kaj vortaron de ĉirkaŭ du mil vortoj. Ili jam eldoniĝas en sep eŭropaj lingvoj, kaj, kiel diras la jena artikolo, aliaj estas pretigataj.

NIA LANDO

Ĉu troviĝos la homujo
Kies ĉirkaŭvasta rondo
Estos tiu de la mondo?
Kio estos la respondo?
Certe, Esperantistujo.

Tra la urboj kaj kamparo
En ĉi tiu lando dia
Sonos lingvo sennacia,
Kiu tamen estos nia,
Lingvo por la tutomaro.

Tie revoj de l' saĝuloj
El la tuta estinteco
Estos bela realeco
En proksima estonteco
Por la veraj homamuloj.

Eble la miljaro venu
Baldaŭ tiel al la tero
Faktigota la espero,
Ke la belo kaj la vero
Regu ĉie kaj nin benu.

Ĉar ĉi tiu nova "ujo"
Havas spacon por alia,
Por la via, por la mia,
Kaj por ĉiuj, kaj por ia,
Ĉies vere grandpatrujo.

—John Lekberg, el Ĉikago, en *La Revuo*.

EL LA PRESEJARO ESPERANTISTA

Paris-Esperanto.—Sub la jena titolo la grupo esperantista de Parizo eldonas monatan ĵurnaleton redaktatan tute france.

Die Internationale Hilfssprache und das Esperanto.—Grava parolo germanlingva de Prof. Wilhelm Ostwald. Prezo, 5 cendoj. *Moller & Borel, Berlin S.*

Brazila Revuo Esperantista.—Nova gazeto 32-paĝa, kompreneble monata, kaj redaktata portugale-esperante. Eldonata de *M. Piedade kaj Ko., Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro.*

Afrika Esperantisto.—En Majo aperis tiu ĉi nova gazeteto, mimeografa eldonaĵo de la klubo en Algero. Ĝi raportas pri granda sukceso de la movado en tiu kiun ni kutime nomas "malluma kontinento."

Tra Parizo.—Aperis en Junio tiu ĉi monata organo de la nova societo, *l'Amicale Esperantiste de Paris.* Ĝi estas redaktata tute france. Jarabono, 2 fr.; ĉe la kasisto de la societo, *Sro. Clement Vachet, 33, Rue Radziwill, 1^{er}, Paris.*

Du Biletoj.—Unu el ili estis loteria bileto, la dua amletero. Ambaŭ gajnis. Sed antaŭ ol la feliĉa fino okazis kelkaj aferoj, pri kiuj amuze rakontas uuuakta komedieto esperantigita de Sroj. H. J. Bulthuis kaj L. Touchebeuf. Prezo, 40 centimoj. *Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacedede, Paris.*

Elektitaj Fabeloj de Fratoj Grimm.—Tiun ĉi bonan kolekton de familiaraj fabeloj tradukis el la germana Dro. Kabe, kies la nomo estas garantio de merita traduko. Oni legas kun nova intereso pri la aventuroj de Cindrulino (*Cinderella*), kaj aliaj konatuloj de la infaneco. Broŝura eldono el la presejo de *Moller & Borel, Berlin S.* Paĝoj, 189; prezo germane markoj 1.50, amerike 36 cendoj.

Majstro Jan Hus.—"La vivo, agado, kondamno kaj morto de la glorinda martiro" (*John Huss*). Tiun ĉi por la kristano aŭ studento tre interesan verkon tradukis kaj aranĝis el verkoj de kelkaj bohemiaj aŭtoroj Sro. J. F. Kuhn, kiu ankaŭ ĝin eldonas. Lia adreso: Vrsce-Kopidlno, Bohemujo. La ekzemplero ricevita ne montras la prezon, iu, por la 50-paĝa broŝuro, oni opinius ĉirkaŭ 1 franko.

Boks & Koks.—Komedio en unu akto, tradukita el la angla (*Box & Cox*) laŭ John Maddison Morton de Sro. Chas. Stewart, B. E. A., kaj speciale eldonita de la komitato por la Tria Kongreso. Tiu ĉi bona verketo de fame

konata angla verkisto, postulante tri personojn, tre taŭgas aŭ por amuzo al la leganto aŭ kiel parto de ia esperantista programo. Broŝuro 27-paĝa, 15 cendoj; aĉetebla ĉe La Trio por la Tria, 13 *Arundel Street, Strand, W. C., London.*

Practical Business Letters in Esperanto.—De Sroj. J. C. O'Connor kaj P. D. Hugon. Bone aranĝita kolekto de praktikaj komercaj leteroj, kun plena tekstoj angla kaj esperanta sur kontraŭaj paĝoj. Prezo, 1 ŝilingo. Eldono de *Guilbert Pitman, 85, Fleet Street, E. C., London.* La prezo citita estas por la unua kajero, 92-paĝa. Kvankam ne de ni ricevita, kredeble aperos aŭ aperis dua kajero, anoncita en la unua. Prosperu tian verkon! Ni varbu al Esperanto la komercistaron, montrante ĝin kiel praktika, laborŝpara ilego. Kiu verkas komercan terminaron?

Kristanaj Preĝoj por Blinduloj.—Presita laŭ Braille'a sistemo de reliefaj leteroj, kompreneble tiu ĉi libro ne estus facile legebla por la plimulto de nia legantaro. Sed ĝi bone taŭgas por propagandilo, montrante la gravan servon kiun Esperanto faras al blinduloj. Presaĵo por blinduloj estas tre multekosta, kaj se povus ili ĉiuj kompreni Esperanton la eldonado de libroj en tiu sola lingvo estus multe pli granda ol estas eble en la diversaj naciaj lingvoj. La libreto citita kostas 50 centimoj (10 cendoj). Oni sin turnu al *Fno. Adria Tellini, Udine, San Rocco, Italujo.*

Solvo de la Problemo de Lingvo Internacia.—Pri tiu ĉi ni represas la antaŭparolon: "La enhavo de tiu ĉi libreto eltirita el la Fundamenta Krestomatio de Dro. Zamenhof estas raporto, verkita de anonima aŭtoro kaj legita en formo iom ŝanĝita kaj mallongigita de Sro. L. de Beaufront en la kongreso de la *Association Francaise pour l'Avancement des Sciences*, Paris, 1900. Kune kun la originala Esperanta teksto, ni donas paralele germanan tradukon de Professor Christaller, de Stuttgart. Al la germanaj esperantistoj kaj nome al komencantoj tre utilos tiu ĉi libreto el kiu ili ĉerpos duoblan profiton: lernadon de Esperanto per teksto modele skribita kaj preskaŭ laŭvorte tradukita kaj fundamentan esploron de la teória flanko de la demando pri lingvo internacia, kiu liveros al ili valorajn argumentojn kontraŭ la plej oftaj atakoj de niaj kontraŭuloj." Broŝuro 125-paĝa. La prezo, 75 pfenigoj. *Moller & Borel, Berlin S.*

Lia Intereso.—Ĉu vi parenas al unu el la geedziĝontaj?

Ne.

Kia, do, estas via intereso je la ceremonio?

Mi estas la venkita kandidato.

—*Pictorial Comedy.*

10M DA LABOREJA BABILADO

The American Esperanto Book Estas preta la "Esperanto Book"! Spite ŝajna komploto inter preslitero-fandistoj, kaj presistoj, bindistoj, kaj Lia Infera Moŝto mem, ĝi estas finita. Ĉu vi jam ricevis la vian ekzempleron? Estas tre necesa ke ĉiu abonanto de nia gazeto posedu tiun ĉi libron, kiu per sia granda vortaro ebligas la facilan tradukon de la enhavo de la gazeto. En la daŭro de kelkaj tagoj ni donos specialan rabaton al iu abonanto kiu ne posedas la "Esperanto Book." Ĝi enhavas 316 paĝojn; tole bindita. Prezo, \$1.00.

The "Esperanto Book" is ready! In spite of a seeming plot among type-founders, pressmen, binders, and His Infernal Majesty himself, it is finished. Have you received your copy? It is very necessary that every subscriber of our gazet possess this book, which by its large vocabulary facilitates the translation of the contents of the gazet. For some days we shall give a special discount to any subscriber who does not possess the Book. It contains 316 pages; cloth bound. Price, \$1.00.

Elements of Esperanto Nova pamfleto 16-paĝa, presata per *long primer* literoj sur bona papero. Kiel signifas la nomo, ĝi montras la elementojn de nia lingvo, lecionetojn, kun la ĉarma Zamenhof'a rakonteto, "La Feino," kun plena angla traduko. Tiun ĉi *bonegan propagandilon* ni vendas unuoble por 5 cendoj. Ni dissemas ĝin *senpage* nur jene: Sendu adresojn de viaj konatuloj, enfermante unucendan poŝtmarkon por ĉiu adreso, kaj ni poŝtigos al ĉiu unu ekzempleron, ĉu vi sendas dek aŭ dek mil adresojn. *Ne skribu*: "Sendu min centon—aŭ, se konvenas, tri milionojn—da propagandiloj kaj mi ilin donos, kompreneble al via profito." Ni havas planon, laŭ kiu, se vi kredas al la ebla profito, ni ĝin dividos kun vi laŭ kontrakto. Pri tio, nin skribu. Ne hontu akcepti gajnon el via laboro por Esperanto, ĉar tio ebligas pli fortan propagandadon. Se vi kunlaboros, ni portos la plimulton da risko, permesante al vi la plimulton da profito.

A new 16-page pamphlet, printed in long primer type, on good paper. As the name indicates, it shows the elements of our language, some little lessons, with the charming Zamenhof storiette, "The Fairy," and complete English translation. This excellent propaganda *ilo* we sell singly at 5 cents. We distribute it *free* in the following manner only: Send addresses of your acquaintances, enclosing a one-cent stamp for each address, and we will send each one a copy, whether you send ten or ten thousand addresses. *Do not* write: "Send me a hundred—or, if convenient, three million—propaganda booklets and I will distribute them, of course to your profit." We have a plan whereby, if you have faith in the possible profit, we will divide it with you by contract. Don't be ashamed to take winnings from Esperanto, for that makes possible a stronger propaganda. If you will cooperate, we will carry most of the risk and allow you most of the profit. Write to us about it.

Poŝtakarto Gramatika Surhavas la tutan gramatikon de Esperanto. Bonega rimedo konigi viajn amikojn je Esperanto. Unu, 2 cendoj; dek, 10 cendoj; cente, 50 cendoj.

The entire grammar of a language on a postal card! An excellent means of acquainting your friends with Esperanto. One, 2c; ten, 10c; one hundred, 50c.

A Press Committee, Consisting of one member for each state, province and territory in North America, can accomplish wonders for Esperanto. Are you willing to help the cause in your own section? Please say so, on a postal card.

Pri ĉio adresu:

AMERIKA ESPERANTISTA KOMPANIO

1239 Michigan Boulevard, Chicago

FAKO DE KORESPONDADO

Unnigiaj Ŝtatoj Amerikaj ; Daŭriĝo el la 2^a de Kovrilo.

LOUIS O. MOSS, 867 Broadway, New York City
A. GILMOUR, 252 Fifth Ave., New York City
H. DE VEAR, 260 W. Broadway, New York City
G. ARCHER CRANE, 204 Franklin Ave, Brooklyn
THOMAS HALL, *Advokato*, 257 39th St., Brooklyn
*Fno. JOSEPHINE HILLS, 215 Ave. E., Brooklyn
D. A. SYLVESTER, 61 Ineens Ave, Flushing, N. Y.
H. O. SIMMONS, Box 817, Schenectady, N. Y.
Dr. AMELIA E. HUNT, The Markeeni, Buffalo, N.Y.
H. W. LIMPER, German Wallace College, Berea, Ohio
H. A. BOYCE, Carmen, Oklahoma
OSCAR ELMER MOREY, Box 4, Jennings, Oklahoma
SAGER DEAN, 2010 N. Marvine St., Philadelphia
H. E. RANDALL, 906 Betz Building, Pittsburg, Pa.
CURTIS B. LORE, 111 W. Market St., Danville, Pa.
H. S. EHRHART, Hanover, Pa.
ALFRED SANG, Garland Nut & Rivet Co., Pittsburg, Pa.
N. H. PROUTY, 1520 Gibson St., Scranton, Pa.
ROGER P. HELLER, 220 E. Broad St., Bethlehem, Pa.
CHAS. W. RAUCH, 57 Spring St., " "
W. G. SECOR, 994 College St., Beaumont, Texas
C. A. VILAS, 1002 Wells Bldg., Milwaukee, Wis.
*H. SIMONDS, Standard Paper Co., Milwaukee, Wis.
FLO. B. SMITH, Hotel Review, Spokane, Wash.
C. G. LINGENFELTER, South Park, Wash.
WM. ROBERTS, Rawlings, Wyoming

KANADO=CANADA

E. S. HARRINGTON, Kentville, Nova Scotia
R. R. BARBER, Georgetown, Ontario
CLIFTON L. ADAMS, Huntingville, Quebec
*MARSHALL CROSSLAND, Dr. 76, Carstairs, Alta.
*WM. T. ROSS, Mound, Alta.
A. S. EMBREE, Box 80, Grand Forks, B. C.

MEKSIKO=MEXICO

P. B. GLLOLDI, Tampico

FRANCUJO=FRANCE

*MARCEL LEFEVRE, 11 St. Mare, Orleans
MIGUIERE, 5 rue Ernset Lefevre, Paris (20)
JOSE MARIETTE, 7 rue du Scorff, Lorient
M. HERY, Bureau de Recrutement, Bethune, Fas de Calais

BULGARUJO=BULGARIA

KOSTA TV. PEĈIGARGEŬO, Plevna
PENKO PETROV, Tambol (Volas korespondi kun Socialistoj)

PORTUGALUJO=PORTUGAL

*P. MANUEL JOSE FERNANDEZ, Coŭto-Arcos de Valdevez

HOLANDO=HOLLAND

ALBERT KNEGT, Suezkade 148, S. Gravenhage

* Oni deziras nur leterojn ; * nur poŝtkartojn ilustritajn.

LA GAZETARO ESPERANTISTA

- Antaŭen Esperantistoj! Esperanta kaj hispana lingvoj. Jara abono, Fr. 3. *Apartado 927, Lima, Peruo.*
- Brazila Revuo Esperantista: Monata, portugala kaj esperanta lingvoj. Jare, 6 frankoj. *Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro.*
- Časopis Českých Esperantistů: En bohema kaj Esperanto. Jarabono, Fr. 3.75. *Praha II, 313, Bořemský.*
- Esperanta Ligilo: Monata organo en reliefpunktoj por blinduloj. Jara abono, Fr. 3. *Th. Cart, 12, rue Soufflot, Paris.*
- Esperantisten: Sveda kaj Esperanta. Jarabono, Fr. 3.50. Adreso: *P. Ahlberg, 38, Surbrunnsgaten, Stockholm.*
- Esperanto: Esperanta-hungara, monata; Jarabono, Kr. 3.80. Adreso: Sro. Marich Agoston, *Ulloi-ut 59, IV, 8, IX, Budapest.*
- Esperanto: Duonmonata gazeto en Esperanto. Jarabono, Fr. 3. Oni adresu: *H. Hodler, 8, rue Bovy-Lysberg, Geneva, Svisujo.*
- Esperanto-Bladet Helpa Lingvo: Dana kaj esperanta; jarabono, Kr. 1.20. *Fno. G. Monster, 54 b, København O.*
- Espero Katolika: Monata; Fr. 5; malfermita por ĉiuj demandoj escepte politikaj. *Pro. Em. Peltier, Ste-Radegonde, Tours, Francujo.*
- Espero Pacifista: monata organo de "Pacifisto," internacia societo por la paco. Fr. 5. *Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine, Francujo.*
- Finna Esperantisto: Jare, Fmk. 1.50. *Parejo Esperantista, Helsinki, Finnlando.*
- Foto-Revuo: Monata gazeto fotografa, franca kaj esperanta lingvoj. Fr. 5. *Charles Mendel, 118 rue d'Assas, Paris.*
- Germana Esperantisto: Monata, en germana kaj esperanta lingvoj. Jarabono, Mk. 3. *Moller & Borel, 95, Prinzenstrasse, Berlin.*
- Internacia Scienca Revuo: Monata; jarabono Fr. 7. Adreso: *8, rue Bovy-Lysberg, Geneva, Svisujo.*
- Internacia Socia Revuo: Monata; jarabono, Fr. 6; kvaronjare, 1.75. *R. Louis, 45, rue de Saintonge, Paris III.*
- Juna Esperantisto: Monata gazeto por junuloj, instruistoj kaj lernantoj. Jarabono, Fr. 2.50. *Preso Esperantista Societo, 33, rue Lucepede, Paris.*
- La Belga Sonorilo: Duonmonata organo en franca, flandra kaj esperanta lingvoj. Jarabono, 5 frankoj. *J. Coox, Duffel, Belgujo.*
- L'Esperantiste: Monata, franca kaj Esperanto. Jarabono, Fr. 3.30. *Louviers, Eure, Francujo.*
- La Revuo: Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta prilaborado de Dro. Zamenhof. Jare, Fr. 7. *Hachette & Co., 77 boulevard St. Germain, Paris.*
- La Suno Hispana: Monata, redaktata hispane kaj esperante. Jarabono, Fr. 3. *A. Jimenez Loira, Avellanas 11, Valencia, Hispanujo.*
- Lingvo Internacia: Monata tutmonda revuo esperantista; jara abono, Fr. 5; kun literatura aldono, 7.50. *Preso Esperantista Societo, 33, rue Lucepede, Paris.*
- Lumo: Monata organo, bulgara kaj esperanta; jara abono, 5 frankoj. *Juan Nenkov, Strato sv. Gorska 2229, V. Tŕnovo, Bulgario.*
- Pola Esperantisto: Monata organo de polaj esperantistoj. Jare, Fr. 2.50. Adreso: "Societo Esperanto", Leopoldo (Lwow), Galicio, Austria.
- Ruslanda Esperantisto: Monata, rusa-esperanta. Jarabono, 3 rubloj. Ĉe: Societo "Espero," Boļš. Podjačeskaja 24, St. Peterburgo.
- Svisa Espero: Monata organo de Svisa Esperantista Societo. Jarabono, Fr. 2.50. Adreso: *Th. Renard, 6, Vieux College, Geneva.*
- The American Esperanto Journal: Organo oficiala de la *American Esperanto Association*. Jarabono, unu dolaro; kun membriĝo en la *A. E. A.*, \$1.50. Adreso: *Boulevard Station, Boston, Mass., U. S. A.*
- The British Esperantist: Monata, angla kaj Esperanto. Jarabono, 3 ŝilingoj. *No. 13, Arundel Street, Strand, London.*
- Tra la Mondo: Tutmonda revuo esperanta, multilustrata; jare, Fr. 8; kvaronjare, Fr. 2.25, unu numero .75. Sin turnu al *Tra la Mondo, 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon, (S.-et-O.), France.*